- **JEFO** = Junulara Esperantista Franca Organizo : organisation des jeunes espérantophones français ou JeunEsperanto France. JEFO est affilié à la fois à TEJO comme «section nationale» et à UFE comme «section jeunes».
- **TEJO** = Tutmonda Esperantista Junulara Organizo : organisation mondiale des jeunes espérantophones, affiliée à UEA comme «section jeune».
- **UFE** = Union Française pour l'Espéranto ou Espéranto-France, affiliée à UEA comme «section nationale»
- **UEA** =Universala Esperanto-Asocio: association mondiale pour l'espéranto
- **Pasporta Servo** : guide d'adresses pour être hébergé gratuitement dans le monde entier lors de voyages à l'étranger, édité par TEJO.
- **Jarlibro** : guide mondial de tous les délégués d'associations ou clubs locaux d'espérantophones, édité par UEA.
- Les associations et entreprises peuvent adhérer à JEFO et entrent dans les mêmes catégories que les plus de 30 ans.
- Conformément à la loi Informatique et Libertés du 6 janvier 1978, vous disposez d'un droit d'accès et de rectification pour toute information vous concernant.
- Si vous adhérez à JEFO en cours d'année, merci de nous indiquer les numéros de *JeunEsperanto Info* et *Koncize* que vous n'avez pas reçus. Nous vous les ferons parvenir dans la limite des stocks disponibles.
- Si vous souhaitez que vos coordonnées restent confidentielles, cochez la case suivante :

Chèque postal, bancaire ou mandat-lettre à l'ordre de "Espéranto Jeunes" à joindre à ce bulletin d'adhésion à : **J.E.F.O. 4 bis, rue de la Cerisaie F-75004 PARIS**

KONKURSO!!!



1 Kg da ĉokolado !

Kiel vi jam scias, en Septembro okazos la Ĉokolada Semajnfino organizita de JEFO.

Por festi tiun eventon, vi jam havas la eblecon gajni **unu kilogramon da ĉokolado!**

Por gajni tiun kilogramon da diversaj specoj de ĉokolado, respondu al la ĉi-subaj demandoj pri FESTO kaj ni lotumos gajnanton inter la bonaj respondoj dum la Ĉokolada Semajnfino.



① FESTO signifas:

- a - Fiku la Elefantojn Sub la Tegmento
- b - Franca Esperantista Sen Tema Organizo
- c - For l'Enuo Sen-Tema Optimismo
- ĉ - Festo Esperanta Sendorma Tutmonda Originala

② Partoprenis en FESTO:

- a - 52 personoj
- b - 69
- c - 90
- ĉ - 111

③ FESTO okazis en:

- a - Lyon
- b - Paris
- c - Villeurbanne
- ĉ - New-York

④ FESTO '96 estis:

- a - la unua
- b - la dua
- c - la lasta
- ĉ - la venonta

⑤ Lyon enhavas:

- a - la nuna unua "Renesanca" kvartalo en la mondo
- b - la nuna dua "Renesanca" kvartalo en la mondo post Venise
- c - la nuna tria "Renesanca" kvartalo en la mondo post Venise kaj Florence
- ĉ - la nuna kvara "Renesanca" kvartalo en la mondo post Venise, Florence kaj Rome.

⑥ Pri kio la urbo Lyon ne estas fama:

- a - silko
- b - gastronomio
- c - tranĉiloj
- ĉ - kinarto

⑦ Kiun monumenton de Lyon oni nomas "panrostilo":

- a - Operejo
- b - Turo "La Part-Dieu"
- c - Hotel-Dieu
- ĉ - Teatrejo "Célestins"

⑧ Koncerto esperanta okazis sur boato la unuan vesperon de FESTO. Tiu boato nomiĝas:

- a - Le bateau blanc
- b - Le p'tit quai bleu
- c - La Marquise
- ĉ - Porte-avion Charles de Gaulle

⑨ Kiom da amaskomunikiloj menciis FESTOn aŭ la kongreson de UFE:

- a - 3
- b - 5
- c - 7
- ĉ - 9

⑩ (Kroma demando)

Kiuj estas la tri riveregoj kiuj trapasas Lyon?

- 1 - _____
- 2 - _____
- 3 - _____

Kio okazas ĉe la junularaj Esperantistaj asocioj de la landoj najbaraj de ni?

Por respondi al tiu demando, jen nova rubriko.

Ĉi-numere ni donas novaĵojn pri NEJ (Nederlando) kaj FLEJA (Flandrio). Tiuj du asocioj agadas komune kaj ekzemple havas komunan bultenon: *Jen* (Jongeren Esperanto Nieuws).

La plej interesa afero kiun tiuj uloj organizas (almenaŭ el nia vidpunkto) estas la Paska Renkontiĝo. Ĝi nun iĝis tradicia renkontiĝo kaj, kiel la nomo antaŭsupozigas, okazas dum la Paska semajnfino.

Bedaŭrinde, malmultas la Francoj kiuj partoprenas al ĝi (verŝajne pro manko da informoj). Do por doni al vi la emon pli bone konatiĝi kun niaj nordaj najbaroj, mi elektis el *Jen* artikolon pri la pasinta Paska renkontiĝo¹.

Se tiu nova rubriko interesas vin kaj se vi volas ke ĝi pluvivu, skribu al ni kaj indiku pri kio vi ŝatus legi en ĝi.



¹ Mi povintus ankaŭ elekti la artikolon titolita "Jongerenvertegenwoordiger", sed ĝi verŝajne malpli plaĉus al vi!

Paska Renkontiĝo

Ekde la 5a ĝis la 8a de Aprilo okazis la Paska Renkontiĝo en Doornspijk kiu troviĝas inter Utrecht kaj Zwolle. La ejo bone situis meze de granda arbaro. Do la ĉirkaŭaĵo estis tre kvieta, sed ne tre longtempe... Ni bone trovis la ejon, sed la vojmontriletoj ne tre helpis al tio.



Kiel ĉiam la akcepto estis tre kora, kaj mi, Lies, kiel nova esperantistino, sentis min tuj akceptita en la grupo. Post la alveno ni manĝis tre bongusta. La interkona ludo konsistis en la farado de etaj poemoj. Sed la vera interkonatiĝo okazis dum la ejoserĉpromenado. Malgraŭ la danĝeraj aproj kaj la sovaĝaj hundoj ni nur iomete perdiĝis en la arbaro. Mallibervole ni vekigis je la oka, kiam la kursanoj devis pretiĝi por la kurso. Ili ne kompatis la malfeliĉulojn kiuj alvenis malfrue de la serĉado kaj tiujn kiuj blufis ĝis mateno.

La distra programo enhavis i.a. la frenezan profesoron Sikosek, la ĵongladon, la bumerangofaradon, ktp. Pro la Paska tempo ĉio kio aspektis kiel ovo estis pentrita. Kvankam la akustiko

ne perfektis la koncerto de afrika muziko tre plaĉis al ni. Iom post iom ni ekplezuriĝis pri la koncerto, kaj multaj inter ni ekmovadis sin spasme...

La semajnfino ne nur bezonis intelektan laboron, sed ankaŭ fizikan, ĉar ni devis bicikli al Elburg. Kelkaj stultuloj denove perdiĝis dumvoje, sed tio ne gravis, ĉar nia ekskurso al la Birdmuzeo ne tiom longe daŭris, kaj ni tuj retrovis la perdiĝintojn.

Malgraŭ la interesa "menuo", ni plej bone memoras la neorganizitajn noktajn vizitojn al la sablodisbloviĝejo², kie eĉ kreskas brakhorloĝuoj. Tie ni ne renkontis sovaĝajn bovinojn, sed sovaĝajn hundojn. Ni eĉ ne vidis frenezulojn, sed aviadilojn kaj batalantajn kavalirojn, kiujn la policistoj serĉis sed ne trovis pro la erariganta aspekto de dekaj esperantistoj.

Vi sendube jam komprenis ke ĉiuj spertis agrablan kaj neforgeseblan tempon en Doornspijk. Tial ni bedaŭras ke por Klaas kaj Maïke tiu ĉi renkontiĝo estis la lasta kiun ili kunorganizas. Sed eble kune kun la nova sango inter la organizantoj venos novaj ideoj per kiuj ili povos ankoraŭ plibonigi la Paskan Renkontiĝon. Ni vidos sekvontjare!

*Sarah kaj Lies Donckerwolcke
Diny Driessens
(el Jen, bulteno de NEJ kaj
FLEJA, represita kun la
permeso de la redaktoro)*

² [NDLR: la aŭtoroj donis tradukon de tiu vorto en la nederlanda, sed bedaŭrinde, temas pri la sola vorto en la nederlanda lingvo kiun mi ne konas. Mi do ne povos klarigi al vi!]

[Daŭrigo de l' artikolo de Laurent pri lia vojaĝo en Rumanio]

Kiujn ŝanĝojn mi konstatis en Rumanio, kompare kun miaj memoraĵoj pri antaŭ tri jaroj, en Aŭgusto 1993?

Nu, antaŭ tri jaroj, mi estis tre impresita de la tiea malriĉeco, probable ĉar tiam mi rapide traveturis la landon, haltante nur en tri stacidomoj. Mi memoras precipe pri la stacidomo de Bukareŝto (kie mi atendis 9 horojn!), en kiu vagis knabeto vestita per kvazaŭ terpom-sako! Li paŝis nudpiede, estis nigre malpura kaj tutprobable vivis en la stacidomo mem (ĉar mi rimarkis, ke ĉiuj fervojistoj bone konis lin). Tiu knabeto, maldika, pensigis min pri la pasintaj jarcentoj...

Estis ankaŭ multaj aliaj pli aĝaj senhejmuloj, kiuj dormis sur la herbejo, antaŭ la stacidomo. Tion mi ne revidis ĉi-jare, probable ĉar tiam estis vintre. Tiuj senhejmuloj probable revenos en la stacidomon samtempe, kiam revenos la varmaj tagoj.

Dua memoraĵo el mia vojaĝo en 1993 estas la atendado ĉe la landlimoj, precipe ĉe la Hungara-Rumana landlimo, kie la trajno haltis unu horon meze de herboverda (!) trakaro. La vagonaron ĉirkaŭis militistoj kun po unu mitraleto, kvazaŭ en milit-tempo. Tio vere ŝajnis ege stranga por Franco, kiu kutimas trapasi la internajn landlimojn de Eŭropa Unio sen halti kaj sen montri sian pasporton.

Ĉi-foje, en 1996, mi ne vidis mitraleton, tamen, la militistoj plu estas kaj la doganistoj plu traserĉas la vagonojn, rigardas sub la seĝoj, en la plafonon, malfermigas la pakajojn, ktp.

Granda diferenco tamen, kompare kun 1993, estas ke nun tiuj oficistoj prezentas multe pli simpatian mienon. En 1993, ili montris sin superaj kaj plenpotencaj, kvazaŭdirantaj "mi havas la povon malhelpi vin eniri en Rumanion". Hodiaŭ, ili eĉ preskaŭ havas rideton ĉe la buŝo! (almenaŭ tiuj, kiujn mi vidis).

En 1993, ĉe la Bulgara-Rumana landlimo, dum prov-babiloj kun vojaĝantoj, la Bulgaroj flustris al mi, montrante aliajn homojn: "Atentu! Estas Rumanoj: estas ŝtelistoj". Kaj kiam mi babilis kun Rumanoj, tiuj-ĉi kaŝdiris al mi, montrante aliuojn: "Atentu! Estas Bulgaroj: estas ŝtelistoj!!!" Mi ne scias, ĉu tiu situacio ŝanĝiĝis!

En 1993 estis neniu *McDonald's*-restoracio en Rumanio. Nun funkcias kelkaj en Bukareŝto, kaj, almenaŭ en Braŝov, estas konstruataj aliaj.



Pri transportoj

Koncerne la publikajn transportojn, ili estas sufiĉe multenombraj kaj tute ne multekostaj (almenaŭ por okcidentuloj). En la urboj, temas pri aŭtobusoj, tramoj, kaj trole-veturiloj. Prezo de simpla veturo kostas apenaŭ egalvaloron de 50 centimoj.

La stratoj estas en ege malbona stato. Ŝajnas, ke ilin oni riparas nur en printempo. Dumsomere kaj dumaŭtune, ili estas en relative bona stato, sed vintro kaj ĝia malbela vetero findetruas ilin. Nur la betonitaj ŝoseoj rezistas kontraŭ la frosto, pluvo, ktp.

Pro tiuj malbonstataj stratoj, diri, ke la ŝoforoj bezonas slalomi inter la truoj, ne estas troigo. Eĉ! Ne maloftas, ke ili ŝoforas maldekstre de la vojo, se tie la asfalto estas en pli bona stato.

Por la nerapidemuloj, eblas ankaŭ vojaĝi per ĉaretoj ĉevaltirataj... kaj ne nur sur la kamparaj vojoj: ankaŭ kelkaj tiaj videblas sur la urbaj stratoj.



Pri la fervojo

Pri la trajnoj, oni povus multon diri. Ilia stato similas tiun de la vojoj: tre malbona. Krom kelkaj trajnoj internaciaj, kiuj haltas ankaŭ en la Rumanaj urbegoj, preskaŭ ĉiuj aliaj trajnoj estas malnovaj kaj ne bontenataj, kun pordoj, kiuj lasas trablovi la venton, ktp. La lampoj ĉe la plafonoj ofte mankas, multaj skribaĵoj (franclingve nomitaj "graffiti"), "ornamas" la seĝojn kaj vandojn. Se la suno blindigas vin, vi ja rajtas tiri la kurtenon sed atentu, ke la tuto ne falu sur vin!


Se vi ofte veturas per trajno, ankaŭ ne forgesu kunporti legaĵojn aŭ aliajn tempopasigilojn, ĉar la lokomotivoj (eĉ kiam ili estas elektraj), ne estas tre rapidemaj. Pluraj horoj ofte estas bezonataj inter la ĉefaj urboj (ekzemple: Bukareŝto-Braŝov: 3 horoj; Bukareŝto-Oradea (landlimo): 10 horoj). Vi ja certe povas admiri la pejzaĝon, sed en vintro (kiam mi tie vojaĝis), la blankaj ebenaĵoj senĉese alternas kun montoj ankaŭ blankaj!

La trajn-kontrolistoj similas al la aliaj ŝtaticistoj: kelkaj deziras ne kompliki al si la vivon. Ekzemple, se vi prezentas eksterlandan strang-aspektan bileton, kian ili neniam vidis, povas esti, ke ili tuj diras "Bone!" (rumanlingve, kompreneble).

Komputilojn havas nur kelkaj giĉetoj ĉe la Bukareŝta stacidomo. La biletoj estas malgrandaj kaj kartonaj, probable simil-aspektaj, al tiuj venditaj de la franca fervojo post la dua mondmilito. (Se iu interesiĝas pri la franca fervojo de la jaroj 1950, faru viziton en la pasintecon, en Rumanion: tie, tia fervojo plu vivas...).

Komence de Marto estiĝis plialtigo de la trajnaj biletprezoj je... 40%! Provu imagi tian subitan altigon en Francio!

En la trajno inter Budapeŝto kaj Rumanio, viro pasis por proponi manĝaĵojn kaj trinkaĵojn. Ilin li transportis per superbazara ĉareto! En alia trajno, kelnero proponis kafon: li portis simplan pleton kun nur tri plastaj glasetoj da kafo!



Pri la taksioj

En la urboj estas ankaŭ multaj taksioj, kiuj atendas la klientojn, precipe ĉe la stacidomoj aŭ noktaj trinkejoj. Ankaŭ la taksioj estas malmultekostaj por la okcidentuloj, sed prefereble estas uzi taksion kun prezo-kalkulilo. En ili la prezon oni mem vidas.

Male, ekzistas aliaj specoj de taksiistoj, kiuj estas kromnomitaj "ŝarkoj". Temas pri taksiistoj, kiuj "ĉasas" la okcidentulojn (t.e. la mon-havantojn). Ili tuj vidas la turistojn kun dorsosako, aŭ kiuj hezite paŝas, ktp. Al tiuj turistoj, ili alproksimiĝas kaj proponas sian taksiservon. Demandite pri la prezo, ili respondas laŭ la kliento: ju pli riĉa vi aspektas, des pli alta estas la prezo. Eĉ se la koncerna prezo ne estas alta por la okcidentuloj, tamen, tio estas trompo.

Kelkaj taksioj havas prezokalkulilon kun du tarifoj. Kiam mi eniris en unu el ili, la ŝoforo tuj elektis la duan tarifon. Ĉu tio estis leĝa? Mi ne scias. Li eble trompis min, sed ne konante la lingvon mi ne kuraĝis plend-demandi.

Tamen, uzi taksion ŝparigas tempon, kontraŭ ne granda prezo (mi ripetas: por okcident-Eŭropano).



Surstrate

Kiam mi alvenis en urbon, ekzemple elirante el stacidomo, kutime min unue frapis la malbeleco de la fasadoj.

Nekredeble multaj estas la reklamaĵoj por internaciaj famaj firmaoj, kiel ekzemple *Coca-Cola*, *Camel*. En komercejaj stratoj, ne maloftas, ke pluraj videblas je nur kelkajn metrojn distance. Ili des pli videblas, ke aliaj reklamaĵoj ne multas (kompare kun la okcidentaj stratoj, kie abundas ĉiaj reklamoj). Probable kialo estas, ke tiuj internaciaj firmaoj senpage donis tiujn reklamaĵojn al la Rumanaj komercistoj, kiuj volonte akceptis ilin por plej malmultekoste "ornami" siajn vendejojn.

Sur la trotuaroj staras aŭ sidas multegaj gevendistoj, kiuj ofertas diversajn aĵojn sed ofte en tre malgranda kvanto: helianto-semojn,... La varoj ofte estas metitaj sur simplajn ligno- aŭ kartonkestetojn. Estas malfacile imagi, kiel tiuj gevendistoj povas tiel gajni sufiĉe da mono por vivi: la investo ja estas malgranda, sed ĉiu vendo nur kelkajn moneretojn ricevigas.

En la stacidomoj, surtrotuare,... renkontiĝas ankaŭ vendistoj de loterio-biletoj.

[Sekvo en la venonta numero]

[Suite de l'article de Laurent sur son voyage en Roumanie]

Quels changements ai-je constaté en Roumanie, comparé à mes souvenirs d'il y a trois ans, en août 1993 ?

Eh bien, il y a trois ans, j'ai été très frappé par la pauvreté locale, probablement parce qu'alors, j'ai traversé rapidement le pays en m'arrêtant seulement dans trois gares. Je me souviens surtout de la gare de Bucarest (où j'ai attendu 9 heures !), dans laquelle errait un gamin vêtu de quelque chose qui ressemblait à un sac de pommes de terre ! Il marchait pieds nus, était noir de crasse et, c'est très probable, vivait dans la gare même (car j'ai remarqué que tous les cheminots le

Tra Rumanio per Pasporta Servo (dua parto)

connaissaient bien). Ce gamin, maigre, m'a fait pensé aux siècles passés...

Il y avait aussi de nombreux autres vagabonds plus âgés qui dormaient sur l'herbe, devant la gare. Cela, je ne l'ai pas revu cette année, probablement parce qu'alors c'était l'hiver. Ces « sans domicile fixe » reviendront probablement dans la gare en même temps que les beaux jours.

Un deuxième souvenir de mon voyage en 1993 est l'attente aux frontières, en particulier à la frontière hongro-roumaine où le train s'est arrêté une heure au milieu de voies vertes (d'herbe !). Des militaires avec une mitrailleuse entouraient le convoi, comme en temps de guerre. Cela semble très étrange pour un Français qui a l'habitude de passer les frontières internes de l'Union Européenne sans s'arrêter et sans montrer son passeport. Cette fois, en 1996, je n'ai pas vu de mitrailleuse, cependant les militaires sont toujours là et les douaniers fouillent toujours les wagons, regardent sous les sièges, dans le plafond, ouvrent les bagages, etc.

Une grande différence néanmoins, comparé à 1993, est que maintenant ces fonctionnaires présentent un air beaucoup plus sympathique. En 1993, ils se montraient supérieurs et imbus de puissance, comme disant: « j'ai le pouvoir de vous empêcher d'entrer en Roumanie ». Aujourd'hui, ils ont presque le sourire aux lèvres ! (au moins ceux que j'ai vus).

En 1993, à la frontière bulgare-roumaine, pendant des essais de conversation avec des voyageurs, les Bulgares me chuchotaient, en montrant d'autres personnes: « Attention ! Ce sont des Roumains: ce sont des voleurs ». Et quand je bavardais avec des Roumains, ceux-ci me soufflaient, en me montrant d'autres personnes: « Attention ! Ce sont des Bulgares: ce sont des voleurs !!! » Je ne sais pas si cette situation a changé !

En 1993 il n'y avait aucun restaurant *McDonald's* en Roumanie. Maintenant, quelques-uns sont ouverts à Bucarest et, au moins à Braşov, on est en train d'en construire d'autres.



Les transports

En ce qui concerne les transports publics, ils sont assez nombreux et pas du tout chers (au moins pour des occidentaux). Dans les villes, il s'agit d'autobus, de tramways et de trolleys. Le prix d'un

aller simple coûte à peine l'équivalent de 50 centimes.

Les rues sont en très mauvais état. Il semble qu'on ne les remet en état qu'au printemps. Pendant l'été et l'automne, elles sont encore en relativement bon état, mais l'hiver et son mauvais temps achève de les détruire. Seules les chaussées en béton résistent contre les grands froids, la pluie, etc.

A cause de ces rues en mauvais état, dire que les conducteurs ont besoin de slalomer entre les trous n'est pas exagéré. Même ! Il n'est pas rare qu'ils roulent à gauche de la rue si l'asphalte y est en meilleur état.

Pour ceux qui ne sont pas pressés, il est aussi possible de voyager en charrettes tirées par des chevaux... et pas seulement sur les routes de campagne : on en voit aussi quelques-unes dans les rues des villes.



Le chemin de fer

On pourrait beaucoup dire sur les trains. Leur état ressemble à celui des routes : très mauvais. A part quelques trains internationaux qui s'arrêtent aussi dans les grandes villes roumaines, presque tous les autres trains sont vieux et non entretenus, avec des portes qui laissent souffler le vent, etc. Les lampes aux plafonds manquent souvent, de nombreuses inscriptions (appelées « graffiti » en français), « décorent » les sièges et les parois. Si le soleil vous aveugle, vous avez certes le droit de tirer le rideau mais attention que l'ensemble ne vous tombe pas dessus !

Si vous voyagez souvent en train, n'oubliez pas aussi d'emporter de la lecture ou d'autres passe-temps car les locomotives (même lorsqu'elles sont électriques) ne sont pas très pressées. Plusieurs heures sont souvent nécessaires entre les villes principales (exemple : Bucarest-Braşov: 3 heures ; Bucarest-Oradea (frontière) : 10 heures). Vous pouvez certes admirer le paysage mais en hiver (quand j'y ai voyagé), les plaines blanches alternent sans arrêt avec les montagnes, blanches également !

Les contrôleurs ressemblent aux autres fonctionnaires : certains n'ont pas envie de se compliquer la vie. Par exemple, si vous leur montrez un billet étranger tel qu'ils n'en ont jamais vu, il se peut qu'il disent immédiatement : « Bien ! » (en roumain, bien sûr).


Seuls quelques guichets à la gare de Bucarest ont des ordinateurs. Les billets sont petits et en carton, ressemblant sans doute à ceux vendus par le chemin de fer français après la deuxième guerre mondiale. (Si

Tra Rumanio per Pasporta Servo (dua parto)

quelqu'un s'intéresse au chemin de fer français des années 1950, qu'il fasse une visite dans le passé, en Roumanie : là, un tel chemin de fer vit encore...).

Au début de mars, il y a eu une augmentation des prix de billets de train de... 40% ! Essayez d'imaginer une telle augmentation soudaine en France !

Dans le train entre Budapest et la Roumanie, un homme passait pour proposer des en-cas et des boissons. Il les transportaient dans un chariot de supermarché ! Dans un autre train, un serveur proposait du café : il portait un simple plateau avec seulement trois gobelets de café en plastique !



Les taxis

Dans les villes, il y a aussi de nombreux taxis qui attendent les clients, surtout aux abords des gares et des bars nocturnes. Les taxis aussi sont peu chers pour les occidentaux mais il vaut mieux utiliser un taxi possédant un taximètre. On y voit soi-même le prix.

Au contraire, il existe d'autres sortes de chauffeurs de taxis qui sont surnommés « requins ». Il s'agit de chauffeurs de taxi qui « chassent » les occidentaux (c-à-d. ceux qui ont de l'argent). Ils repèrent immédiatement les touristes avec un sac à dos ou qui marchent avec hésitation, etc. Ils s'approchent de ces touristes et leur proposent leur taxi. Interrogés sur le prix, ils répondent selon le client : plus vous paraissez riche, plus le prix est élevé. Même si le prix en question *n'est pas* élevé pour les occidentaux, c'est quand même une tromperie.

Quelques taxis ont un taximètre avec deux tarifs. Quand je suis monté dans l'un deux, le chauffeur a tout de suite sélectionné le deuxième tarif. Était-ce légal ? Je ne sais pas. Il m'a peut-être trompé, mais ne connaissant pas la langue, je n'ai pas eu le courage de poser une question. Cependant, utiliser un taxi fait gagner du temps pour un prix modique (je répète : pour quelqu'un d'Europe de l'ouest).



Dans les rues

Quand j'arrivais dans une ville, par exemple en sortant d'une gare, en général j'étais frappé par la laideur des façades.


Les publicités pour des marques célèbres internationales sont incroyablement nombreuses, comme par exemple *Coca-Cola*, *Camel*. Dans les rues commerçantes, il n'est pas rare que plusieurs soient visibles à seulement quelques mètres de distance. Elles sont d'autant plus visibles, qu'il n'y a pas beaucoup d'autres publicités (comparé avec les rues occidentales, où abondent toutes sortes de réclames). La raison en est probablement que ces firmes internationales ont donné gratuitement ces publicités aux commerçants roumains qui les ont volontiers accepté pour « décorer » leurs magasins à un moindre coût.

Sur les trottoirs se tiennent debout ou assis de nombreux vendeurs qui offrent diverses choses, mais souvent en très petite quantité : graines de tournesol, ... Les marchandises sont souvent posées sur de simples caissettes de bois ou de carton. Il est difficile d'imaginer comment ces vendeurs peuvent ainsi gagner assez d'argent pour vivre : l'investissement est certes petit, mais chaque vente ne procure que quelques petites pièces.

Dans les gares, sur les trottoirs, ... on rencontre aussi des vendeurs de billets de loterie.

[Suite au prochain numéro]

Laurent





Esperanto Ĥorstaĝo

*Kanti, skii, dum unu semajno eĉ se ne sperta, tamen sukcesa kaj
ĝojiga dank'al lerteco de Zdravka, zorgeco de Jorgos, kaj
amikemo de esperantistoj.*

Pendant les vacances de février, nous avons l'habitude de faire une semaine de ski de fond dans un petit village de montagne. Cette année je découvre une petite annonce dans la revue hongroise *Eventoj* : stage de ski, chant choral, espéranto dans l'Ariège. C'est vite décidé : on y va ! Et nous ne regrettons pas ; nous aussi, on a mis huit jours à s'en remettre ! Nous étions un groupe d'une quinzaine, guidé par Zdravka, chef de chœur bulgare, qui nous a avoué le dernier jour qu'elle s'était demandé quel matériel elle aurait devant elle, et ce qu'elle pourrait en tirer. Finalement nous nous en sommes très bien sortis, après quelques heures d'angoisse devant des rythmes bulgares à dormir debout, et grâce au professionnalisme et à la patience de Zdravka. Nous répétions 5 heures par jour, et le dernier jour nous avons donné un petit concert public dont l'enregistrement est disponible, il suffit de demander. Notre répertoire était des plus varié : bien sûr des chants bulgares, mais aussi tchèques, québécois, américains, italiens, catalans, en passant par les fameux canons de *Kajto*. Nous avons découvert là une culture du chant en espéranto que nous ne connaissions pas vraiment, et ça nous a donné envie de continuer. Toute la famille a apprécié, et si d'aventure, en passant près de chez nous, vous entendez quelques délires cacophoniques, ne vous inquiétez pas : de temps en temps, tous les cinq, nous nous faisons plaisir en chantant quelques partitions à 4 voix.

La ge—Clopeau—j

stage de fin de semaine

ESPERANTO - CHANT

à Saint-Brieuc

les 9, 10, 11 Novembre 1996

Au programme :

- ☒ ESPERANTO (découverte ou perfectionnement)
- ☒ CHANT CHORAL (répertoire du monde entier en espéranto, chef de chœur professionnel)

Le lieu précis et l'organisation ne sont pas encore fixés. Vous pouvez cependant vous renseigner à :
Espéranto 22 - 6, rue J.-P. Calloc'h, 22000 Saint-Brieuc (tél/fax : 96 94 08 54)

(Informoj el la Esperanto-grupo de Saint-Brieuc - 22)

Raporto pri OKEJ en Londono

Kiel jam klarigite en la pasinta numero, la konferenco "OKEJ" okazis dum Junio en Londono. Ĝin ĉeestis reprezentantoj el la junularaj asocioj de Belgio, Britio, Francio, Germanio kaj Nederlando. Krome estis reprezentantoj de TEJO kaj la revuo *Koncize*, kaj observantoj el Hispanio kaj Ĉeĥio.

Dum unua parto de la konferenco, ĉiuj prezentis la agadon en sia asocio. Maja, el BonEJO, prelegis pri havigo de subvencioj ĉe la eŭropaj instancoj. Dum dua parto, ni diskutis pri komunaj projektoj.

Jen do la gravaj informoj kiuj rezultas de niaj diskutoj:

Ni starigos komunan renkontiĝon venontsomere. Ĝi estos kunorganizita de la OKEJ-landoj kaj okazos en Britio.

La redaktoro de *Koncize* informas ke li ne volas ke tiu revuo estu aliĝilaro, sed respegulo de la vivspertoj de junaj eŭropaj esperantistoj. Mi do invitas vin kontribui al tiu grava projekto per sendado de artikoloj al *Koncize*.

Estos pli fortaj ligoj inter la OKEJ-landoj, ĉefe en la kampo de interŝanĝo de informoj (kiel ekzemplo, vidu novan rubrikon je paĝo 12).

Venonta OKEJ-kunveno okazos je la sama dato venontjare en Parizo.

Tony GUYOT



INUTAJ INFORMOJ -- LASTMINUTAJ INFORMOJ -- LASTMINUTAJ INFORMOJ -- LASTMINU

++ Atenton! La JEFO-sidejo estos escepte fermata sabaton, la 3an de Aŭgusto 1996 ++ *Attention ! Le siège de JEFO sera exceptionnellement fermé samedi 3 août 1996* ++

++ La VINILKOSMO-kompilaĵo aperos samtempe, kiel tiu ĉi bulteno. Ĝi estos havebla (interalie) dum IJK kaj KEF ++

JUNULARA
ESPERANTISTA
FRANCA
ORGANIZO
Jeun Espéranto France
4 bis, rue de la Cerisaie
75004 PARIS

36 15 ESPERANTO
36 14 CNX*#JEFO
<http://www.worldnet.fr/~mjb/jefo/>

Direktoro de la eldono:
Bruno Flochon

Redaktoro:
Tony Guyot

Rubrikoj:
**Laurent Vignaud, Philippe Bérizzi,
Bruno Flochon**

Partoprenis al tiu numero:
**Lucia-Mary Berthelín, Alain
Fagot, Nikola Markarian,** la
Esperanto-klubo de Saint-Brieuc, la
redakcio de Jen-gazeto kaj la
kontribuintoj de la rubriko
"Malesperantio".
Dankon al ĉiuj!

Tiu ĉi numero kompostatis komputile komence de Julio kaj presatis je 300 ekzempleroj. Por aliĝi al JEFO kaj ricevi regule *JEFO-informas*, plenigu kaj sendu la aliĝilon inter la paĝoj 10 kaj 11. Ne forgesu ke JEFO deĵoras ĉe la sidejo (adreso supre) ĉiujn unuajn kaj triajn sabatojn ĉiumonate, ekde la 14a horo (kurso je la 17a). Sendu viajn artikolojn antaŭ la fino de Septembro por la kvara numero de 1996. Ne forgesu ankaŭ fotojn, desegnojn, ktp. Ĉiuj kontribuoj bonvenotaj!


Ce numéro a été composé par ordinateur début juillet et imprimé à 300 exemplaires. Pour adhérer à JEFO et recevoir régulièrement *Jeunespéranto-Info*, remplissez et renvoyez le bulletin d'adhésion situé entre les pages 10 et 11. N'oubliez pas que JEFO tient une permanence au siège de l'association (adresse ci-dessus) chaque premier et troisième samedi du mois, à partir de 14 heures (cours à 17 heures).

Envoyez vos articles avant fin septembre pour le quatrième numéro de 1996. N'oubliez pas les photos ou dessins pour illustrer ces articles. Toutes vos contributions sont les bienvenues!

La artikoloj en *JEFO-informas* reliefigas la vidpunkton de ties aŭtoroj, ne nepre tiun de JEFO. Tamen JEFO permesas al si la rajton publiki aŭ ne tiujn artikolojn. Represatoj estas permesataj, kondiĉe ke oni indiku la nomon de la aŭtoro kaj la fonton kaj ke JEFO estu informita.

Les articles parus dans *JeunEspéranto-Info* n'engagent que leurs auteurs. Toutefois JEFO se réserve le droit de les publier ou non. Tous droits de reproduction autorisés sous réserve d'indication de l'auteur et de la source et sur simple information à JEFO.

Imprimerie: spéciale
Dépôt légal: à parution
Commission paritaire: en cours



LETEROJ DE NIAJ LEGANTOJ

(kompilas Laurent)

✍ APPRENDRE L'ESPERANTO PAR LE RUSSE

Où pourrais-je acheter une méthode, en langue russe, pour apprendre l'espéranto ? (Thierry)

Le plus simple et le plus logique est de s'informer directement auprès de: Rusia Esperantista Unio, a/k 67 RU-105318 MOSKVA, RUSSIE

📖 COURS AUX ETATS-UNIS

Je souhaite approfondir ma connaissance de l'espéranto: est-ce que JEFO pourrait m'inscrire aux cours d'été de San Francisco, pour le mois de Juin ? (Aliou, Sénégal)

C'est très difficile parce que Espéranto-Jeunes n'est encore qu'une petite association de niveau national, et qu'il nous est impossible à l'heure actuelle de financer de tels projets.

📧 MALSIMPLA ALIĜILO KAJ FINO DE ABONO

Mi ne bone komprenas, kiujn bultenojn JEFO-patrono ricevas? Ĉu vi atentigos min, kiam finiĝos mia aliĝ-periodo ? (Jean-François, el Nice)

Aliĝante al JEFO, kiel patrono, vi ricevas kaj JeunEspéranto-INFO, kaj la Eŭropan bultenon KONCIZE. Abonante la bultenon, vi ricevas nur ĝin.

Kiam al vi estos sendata la lasta bulteno, al ĝi estos aldonita letereto, por memori vin pri realiĝo, se tion vi ne jam estos farinta. Tamen, por plifaciligi la laboron de la sekretario kaj de la kasisto, ni petas vin mem memori pri la realiĝ-tempo, t.e. unu jaron post via aliĝo.

☒ MI NE KOMPRENAS

Mi ricevas la revuon "Franca Esperantisto" sed ne aliĝis al UFE. Male, mi aliĝis al TEJO sed ne ricevas la koncernajn bultenojn, nek la jarlibron. (Katell)

Antaŭ kelkaj monatoj okazis inter-konsento inter UFE kaj JEFO, ke la JEFO-membroj malpli ol 30-jaraj ricevos senpage "Franca Esperantisto" dum unu jaro.

Pri TEJO kaj la revuoj "KONTAKTO" kaj "TEJO-Tutmonde" kaj la jarlibro, paciencu: ĉiujfoje la novaj membroj malfrue ricevas siajn unuajn numerojn. Pri la jarlibro, la afero similas, sed koncernas ĉiujn membrojn: ĝin oni kutime ricevas ne antaŭ Junio.



Jean **E** Sperant INFO


vous présente les autres revues auxquelles vous pouvez vous abonner grâce à **JEFO** :



ESPERANTO
mensuel édité
par UEA



KONTAKTO
bimestriel édité
par TEJO/UEA



KONKIZE
bimestriel édité
par les associations
de jeunes espéran-
to-phones européennes



FRANCA
ESPERANTISTO
mensuel édité par
Espéranto France



TEJO TUTMONDE
bimestriel édité
par TEJO